



Nº 09 -SEP / 83 ...

INFORMA BULTENO DE BRAZILA ESPERANTO-LIGO Boletim Informativo da Liga Brasileira de Esperanto Praça da República 54-29 andar - 20.211 - Rio de Janeiro-RJ BRASIL (Tel: 2326309)

IMPRESSO

UEA: NOVAJ KOTIZOJ POR 1984

Pere de cirkulero (1983.08.23), la direktoro de la Centra Oficejo de UEA sciigis nin pri la jus fiksitaj kotizoj por 1984. Aldone, li klarigis, ke la Komitato aprobis ĝeneralan kotizaltiĝon de 12%. Tamen, pro la ekonomiaj malfacilaĵoj en Brazilo kaj najbaraj landoj, UEA ne kalkulis tiun altiĝon por la latinamerikaj kotizoj.

Interkonsente, la du landaj asocioj (BEL kaj KKE) decidis subteni la samajn kriteriojn disvastigitajn de "BEL-informas" n-ro 4 / Apr/83, rilate al la kalkulado de

kruzejraj ekvivalentoj por UEA-kotizoj /1984.

Resume , jem la kriterioj:

1) La ekvivalenta kotiztabelo por Brazilo baziĝos sur la samaj valoroj fiksitaj de UEA, laŭ Jarlibro/83, por la internacia respondkupono, tio estas :1 rpk=0,9gld.

2) La du perantoj akceptos de la membroj pagon , pere de respondkuponoj au en ekvi-

valentaj kruzejroj;

3) Por la kalkulo de la ekvivalentaj kruzejroj, la interesitoj devas multobligi la nombron de la necesaj respondkuponoj por ĝia aktuala valoro. Do, sufiĉas, ke la interesitoj demandu al iu ajn poŝta agentejo la kurantan prezon de la rpk por fari la nepran konverton al kruzejroj.

Fine, ni prezentas al vi la novan tabelon por 1984. Krome, por faciligi la komparon inter la kotizoj de 1983 kaj 1984, ni represas la tabelon de la kuranta jaro.

esp.	gld. rpk. (*)	0,78 1 270,00	MJ(-K) 15,60 18 4.860,00	MA(-K) 39,00 44 11.880,00	23,40 26 7.020,00	11,70 13 3.510,00	78,00 87 23.490,00
do	gld. rpk. 6\$\$(*)	0,80 1 270,00	16,00 18 4.8 60 ,00	40,00 45 12.150,00	24,00 27 7.290,00 ELOJ ONI KO	12,00 14 3.780,00	80,00 89 24.030,00

) BONVOLU RIMARKI, KE EN LA SUPRAJ TABELOJ ONI KONSIDERIS 1 rpk=6\$ 270,00. ANTAŬ OL SENDI VIAN KOTIZON AL PERANTO, NEPRE KONTROLU, ĈU LA RESPOND-KUPONO ALTIĜIS. SE JES, REFARU LA KALKULON.

SANGO DE CEFDELEGITO EN BRAZILO

Jus okazis dum la 68a U.K. la estrara vocdono pri sango de nia cefdelegito. La Oktobra numero de la revuo ESPERANTO oficiale informos pri la aprobo de la nomo interkonsente prezentita de BEL kaj KKE por plenumi tiun gravegan postenon. Ni uzas la okazon por gratuli la novan cefdelegiton, S-ron IVON BARBOSA, el Bauru-SP.

Ni estas konvinkitaj, ke li sukcesos daurigi la diligentan laboron faritan de lia anstatauito, S-ro Giusepe Grattapaglia.

HEROLDO DE ESPERANTO: NOVAJ KOTIZOJ. PROFITU LA OKAZON:

El cirkulero sendita de HdE, la 3lan de Augusto 1983, ni prenis la jenajn in-

formojn:

"Ciuj tutnovaj devizaj abonantoj, kiuj pagos nun ĉe vi por 1984 (tiu oferto validas nur ĝis 31.XII.83) ricevos senpage la lastajn ĉijarajn numerojn, ekde la momento de abono ĝis la fino de 83 (ĝis eventuala elĉerpiĝo)."
"Sciencaj Suplementoj: en 1984 aperos 16 numeroj plus antaŭe planite Scienca Suplemento pri ekologio (red. Janusz Sulzycki, Pollando). Supozeble aperos krome speciala kanada kongreslanda Suplemento."

Finfine, la plej bona informo: La baza jarabono de HdE por 1984 restas senŝanĝa. Tamen, por nia lando estas speciala tarifo: Marpoŝte - US\$ 7,00. Aerpoŝte-US\$ 10,00. Bonvolu rimarki, ke pro transpagaj malfacilaĵoj, BEL nur akceptos internaciajn respondkuponojn aŭ iliajn respondajn valorojn en nia nacia valuto, laŭ suba tabelo:

MARPOŜTE - 23 respondkuponoj = (hodiaŭ) 6\$\$ 270,00 x 23 = 6\$ 6.210,00.

AERPOSTE - 32 respondkuponoj = (hodiaŭ) (## 270,00 x 23 = (# 6.210,00. AERPOSTE - 32 respondkuponoj = (hodiaŭ) (## 270,00 x 32 = (# 8.640,00.

PRI NIA MEMBRARO : LASTAJ CIFEROJ Jen la lastaj informoj pri BEL-membriĝoj :

MEMBRARO	MS	Ml	M2	DM	BM	SUME	
gis 1983,06.30 gis 1983.07.31 gis 1983.08.31	193 208 231	114 117 123	15 16 17	23 23 25	2 2	347 366 398	

Cu vi estas unu el tiuj, kiuj forgesis pagi la jarkotizon respondan al la kuranta jaro? Kie estas la brazilaj movadanoj? Se vi opinias, ke niaj kotizoj estas tro altaj, aliĝu almenaŭ kiel Membro Simpatianto (\$\mathbb{L}\$ 1.500,00 jare !), por ke ni ne plu hontu pro tiu malgranda cifero (398 !), kiu tute ne reprezentas la nombron da ekzistantaj brazilaj esperantistoj.

S-ano Cleber Lemos, Prezidanto de Esperanto-Klubo de Petropolis (Rua Paulo Barbosa 147, s/8, 25.600- Petropolis-RJ), sciigis nin pri funkciado de Elementa Kurso de Esperanto, ekde la 18a de Augusto 1983, ĉiujaŭde, ĉe sidejo de EDUCANDÁRIO PROFESSORES UNIDOS-EPU. Gvidas la kurson S-ro Délio Pereira de Souza. Ĉeestis la unuan lecionon 44 gelernantoj.

LANCO DE RARA VERKO

En la sidejo de Brazila Esperanto-Ligo , la 27an de Augusto , sabaton , de la 18a ĝis la 19a horo , estis lanĉita la tria eldono de MICROCOSMOS (Sonetos de Versos Monossilábicos), de la poeto Diderto Freto. Tiu ĉi verko estas bibliografia raraĵo , ĉar ĝi konsistigas la unikan kolekton da sonetoj el monosilabaj versoj de la portugala lingvo. La okazaĵo allogis plurajn neesperantistoj al BEL. Inter la ĉeestantoj troviĝis estraranoj de la eldonejo SHOGUN ARTE.

Laŭ bulteno eldonita de Associação Espírita Estudantes da Verdade (Rua Carlos Chagas 708 - Lucas, 27.180 -Volta Redonda-RJ), tiu asocio jus kreis fakan grupon pri la internacia lingvo. Ciumonate, la trian sabaton, la grupanoj kunvenas por interŝanĝi ideojn, aŭdi Esperantajn sonbendojn, agadplani ktp.

LA TRIA FORUMO DE BEL - NEPRE CEESTU :

Sabaton, la 24an de Septembro, de la 5a ĝis la 6a vespere, okazos la tria "Forumo" de BEL, tio estas, debatoj en Esperanto, kun la partopreno de enskribitaj oratoroj kaj de la ĉeestantoj.

TEMO : IDEOJ POR PROGRESIGI LA ESPERANTO-MOVADON

DEBATONTOJ:

JORGE SOARES DAS NEVES, JOSÉ BONIFÁCIO LEITE, PAULO SÉRGIO VIANA kaj LUIZ ALBERTO COELHO.

La unua "Forumo " okazis la 2an de Julio 83 (temo: Instrumetodoj en Esperanto).
La dua okazis la 27an de augusto pasinta (temo: La mortopuno)
Ambaŭ estis plene sukcesaj.